

& Kantoplenas nun la tag':

< Rekante 13 el 37 batoj por strofo, entute 185 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #3233. Verkis Jeppe Aakjær (1911). Komponis Carl Nielsen (1915). Tradukis Poul Thorsen. Pro baladigo mankas en la melodio unu lasta taktero.>

(#Melodio:

<:37> (

/MiSo Fa Re DoLA SO O;Do MiSo do hSo Fa Mi i; ReTI Do oMi ReSo So; hLa Ti
hRe SoFi La So o;

(#Rekantaĵe: LaLa La3La SoFa Mi; SoSo So3So FaMi Re; DoSo FaLa Mi lRe Do)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Kantoplenas nun la tag', ; kaj venis la
vanelo. ; Distamburas galinag' ; por
nokta am-apelo.

(×:; **Pluki tigojn kun roser' ; pluki
junkojn ĉe river', ; pluki, pluki
flo2rojn.)**

'2 Oran flavon sur ravin' ; la pezaj
kaltoj ĵetas. ; Suda vent' proponas sin, ;
kaj noktkandeloj cedas.

'3 Tutan tagon el laget' ; sin levas
butom-tigoj: ; meĉoj sveltaj - arda pet' ;
pri suno-ekbruligoj.

'4 Junulinoj nun sur silk' ; por nupta
festo stebas. ; Manke de svatanto-bild' ;
en revoj unu ŝvebas.

'5 Donu neforgesumin ; kaj laste
krispomenton. ; Tiel nia ludo-fin' ;
similas la komencon:)